# FELIETONO.

PROF. D-RO BENEDIKT DYBOWSKI.

## Popola kuracado de sifiliso en Kamĉatka.

Alveninte en la jaro 1879 en Kamĉatka'n, kiel kuracisto de la distrikto kamĉatka-a, mi trovis tie tri hospitalojn por sifilisuloj, jam de tri jaroj funkciantajn. Direktis ilin Kowalow kaj Baczynskij, kuracistoj, speciale por tiu ĉi celo elsenditaj, ĉe kunhelpo de kelkaj subĥirurgoj kaj onu akuŝistino. Jara kosto de la ekspedicio estis 25,000 rubloj kaj oni esperis, ke dum tri jaroj estos eble resanigi la tutan loĝantaron de Kamĉatka. Samtempe kun tiu ĉi ekspedicio aliaj kuracistoj estis elsenditaj al la lando de Jakutoj, kie ankaŭ la tuta loĝantaro estis infektita per sifiliso.

La kuracistoj, senditaj Kamĉatka'n, ne volis resti plue, ĉar ili dubis pri ebleco plenumi la taskon, kiun ili provizore akceptis. Kowalow ne restadis eĉ tri jarojn. Baczynskij eltenis ĝis fino de la trijara kontrakto.




Fig. 1. Hospitalo por sifilisuloj en Pietropawłowsk, konstruita el tabuloj, alveturigita kompleta el S. Francisko en Ameriko; trablovata per vento, trafrostiĝanta, havanta malaltajn plafonojn, trasorbiĝanta, kiam ĝi vintre estis superŝutita per neĝo.

Post ilia forveturo mi devis kontroli, kiom la kuracado en la hospitaloj havis bonan influon sur la loĝantoj, suferantaj je sifiliso kaj lepro kaj ĉu estus dezirinde daŭrigi plue la agadon per hospitala kuracado. Mi konvinkiĝis, ke la konstruaĵoj de la hospitaloj ne estis konvenaj por kuraci la malsanulojn. La hospitalo en Pietropawłowsk (Fig. 1.), konstruita el tabuloj, vintre tute trafrostiĝadis, per la fendoj inter tabuloj vento trablovadis kaj defluadis akvo el degelanta neĝo.

En la vilaĝo Kluczy la temperaturo vintre defaladis ĝis 0° en ĉambroj, kie la malsanuloj kuŝadis. (Fig. 2).

En Tigilo mi trovis la hospitalon en kompleta ruino.

Plue de la malsanuloj, kuracitaj en la hospitaloj, $^{3}/_{5}$ denove estis malsanaj jam post 2 jaroj de la tempo de hospitala kuracado. Entute mi konvinkiĝis, ke la kuracado alportis neniajn bonajn rezultatojn.

Prenante en kuracadon la malsanulojn en la hospitalo Pietropawłowsk'a, mi trovis leprulojn kaj sifilisulojn kunmikse lokitajn kune, ĉar ambaŭ malsanojn oni konsideris kiel du diversaj formoj, devenantaj de la sama fonto. Tia regis opinio pri lepro ĝuste, kiam mi venis Kamĉatka'n.

Nome en Kamĉatka oni traktis lepron unu fojon kiel ekstreme infekta sufero, duan fojon kiel sufero, tute neinfekta kaj konforime kun tiuj opinioj daŭris unu periodo, kam leprulejoj estis starigataj kaj kiam sub minaco de mortpuno estis malpermesata ia ajn interrilato kun malsanuloj, poste sekvis ordinare dua periodo, kiam oni libere dissendis la malsanulojn, permesante, ke ili loĝadu ĉe siaj parencoj. Tamen la vilaĝanoj ne fidis al tiuj opinioj de kuracistoj kaj ordinare aranĝis apartajn loĝejojn por lepruloj. Oni loĝigis ilin ordinare en banejoj sen fornoj, en tiel nomataj „ĉornije banje", kie tiuj ĉi malfeliĉuloj dum vivo estis entombigitaj. Ĉe Korjakoj estis konstruataj apud la vilaĝo subteraj loĝejoj kaj tie, en veraj kavernoj, oni malliberigadis la malsanulojn, sen hejtado, sen vestaĵo, sen ia kompato por tiuj mizeruloj.

Mi alvenis Kamĉatka'n ĝuste en la momento, kiam ĉe la estraro regis la opinio, ke lepro ne estas infektema, tial ankaŭ en Pietropawłowsk mem lepruloj loĝis en siaj loĝejoj kaj komunikiĝis kun la loĝantaro sen ia ajn rezervo.

Unu de la kuracistoj, kiuj antaŭ mi funkciadis, dro Wimut, esplorante la sifilisulojn, trovis multajn el ili sen nazo kaj en la momento, kiam li ilin ekzamenis, ili sentis sin tute sanaj. Demandataj, ĉu ili sin kuracadis, ili respondadis, ke ili ne estis kuracataj. Trovinte tiamaniere laŭdirajn pruvojn, ke la sifiliso kuraciĝas sen helpo de kuraciloj, li opiniis ebla en sia raporto akcepti

por certa la fakton de memkuracado de sifiliso per la viveca forto de la organismo. Siajn observojn komunikis d-ro Wimut ankaŭ al mi kaj la faktoj, kiujn li citis, estis komence tiom konvinkaj, ke mi kredis ilin realaj. Mi sciiĝis pri multaj sekretoj, ordinare kaŝataj antaŭ la kuracisto.

Tiel ekzemple en la vilaĝo Jawina mi renkontis maljunan virinon (Fig. 3.) sen nazo, kiu komence ne volis konfesi, ke ŝi estis




Fig. 2. La hospitalo por sifilisuloj en vilaĝo Kluczy apud la rivero Kamĉatka. Ĝi konsistis el du malnovaj domoj, estis kovrita per larika ŝelo. Tra la tegmento fluetis akvo 'pluva kaj vintre tuta subtegmento estis plena je neĝo. La temperaturo en ĉambroj de malsanuloj tage ne estis super 5—6 R., nokte do akvo glaciiĝis en vazoj dum tuta vintro.

notis ekzakte la cititajn detalojn kaj dum la rondvojaĝo tra ĉiuj enlandaj vilaĝoj mi penis konvinkiĝi pri vereco de la komunikaĵoj, faritaj al d-ro Wimut de la malsanuloj.

Hazarde en konversacio kun unu pli inteligenta popo mi eksciiĝis, ke la loka loĝantaro kuracas sin kaŝite per medikamentoj, malpermesitaj de la estraro kuracista kaj ke tiuj ĉi medikamentoj estas tre efikaj. Tiel ekzemple li rakontis, ke li mem antaŭ 15 jaroj kuracis sin per cinabra incensado aŭ „ĉirkaŭfumado“ („kurenje kinawarju“) kaj ke de tiu tempo li sentas sin tute sana. Li montris al mi cikatrojn post vundoj sur la piedoj kaj priskribis siajn suferojn, kiel ankaŭ la diversajn kuracadojn, kiujn li entreprenis laŭ konsilo de kuracistoj kaj kiuj estis senefikaj, ĝis li fine decidiĝis al kuracado cinabra. Mi petis lin, ke li priskribu detale la kuracmanieron per cinabro, kion li ankaŭ faris kaj pri kio mi pli poste rakontos. Dume mi mencias, ke li estis ĉirkaŭincensata 7 foje kaj ke por tiu celo estis uzitaj ĉirkaŭe 19 gm. da cinabro.

Trovinte tiamaniere ŝlosilon por malkaŝi pluajn sekretojn kaj deklarante al malsanuloj, ke mi principe ne kondamnas la kuracadon per cinabro kaj sublimato, mi penis akiri konfidon de malsanuloj kaj en tio ĉi plene sukcesis. Mi ekkonis kelkajn popolajn kuracfuŝistojn („znachorzy“), uzantajn dekokton de Zitman, sublimaton kaj cinabron kaj kuracata per cinabro, sed post kiam mi al ŝi estis deklarinta, ke mi ne kondamnas tiun kuracadon, tiam ŝi post multaj diversaj elturniĝoj konfesis, ke oni ŝin kuracis, sed ke oni ŝin al tio perforte devigis.

Tiel do la timo pri respondeco kaj puno, minacanta pro delikto, detenas la homojn de la malkaŝa konfeso, ke ili kuracis sin per malpermesitaj rimedoj.

Ofte mi min demandis, kia povus esti la kaŭzo, ke oni malpermesadis al la loĝantoj memkuracadon. Ĉu oni sin gvidis ĉe tio per homamo?

Se tiel estus, oni ne lasus sen kuracado 500 malsanulojn inter 3,000 de tuta loĝantaro. Se oni ja ne havis rimedojn por kuracado, kiarajte oni forprenis al tiuj malsanuloj la esperon de resaniĝo, kiun ili havis, submetante sin al la kuracado de kuracfuŝistoj.

En pli grandaj urboj estas tre rigore observataj la porskriboj sanitaraj, oni detruas la nefreŝan fiŝon kaj samtempe punas la vendistojn, kiuj tiaspecan komercaĵon vendas. Jen al unu de distriktestroj en Kamĉatka, Popow, estis konata tiu regulo sanitara kaj li intencis ĝin apliki en Kamĉatka, sekve li malpermesis uzadon de tiel nomata „kisła ryba“, aŭ fiŝo putrinta, konservadata en kavernoj. KomprenebIe tiun ord non neniu obeis, ĉar la homoj dum malsateca tempo, kiu preskaŭ ĉiujare revenadis Kamĉatka'n, nepre devas sin nutri per tio, kion ili havas dome. Se Popow po-

vus doni al la malsatintaj Kamĉatka'anoj sanecan nutraĵon, li havus la rajton malpermesi uzadon de putrinta fiŝo, tamen ĉar li tion fari ne povis, tial liaj ordonoj restis sen ia ajn efiko: malgraŭ minaco de puno ĉiuj manĝis la fiŝon putrintan.

Tiel same estis kun la malpermeso de kuracado cinabra kaj sublimata.

Kaj nun kelkaj vortoj pri la hospitaloj. La sinjoroj kuracistoj, alveninte Kamĉatka'n ekokupis sin per perforta transportado de malsanuloj en la hospitalojn kaj se ili renkontis en vilaĝo iun malsanulon aŭ malsanulinon, ili ordonis veturigi tiujn ĉi sen ia ajn konsidero hospitalon, kelkfoje je centoj da verstoj, kio daŭris ĉe neĝolovadoj kelkajn semajnojn. La vojaĝo fariĝadis plejparte vintre, kelkjoje sur plej malfacilaj vojoj kaj ĉe plej granda malvarmego, krom tio oni forprenadis iafoje la unikan mastrinon el la kabano. Tiu ĉi perforto tiom timigis la loĝantaron, ke ĉe sciigo pri alveno de kuracisto oni kaŝis la malsanulojn aŭ ilin forveturigis post la vilaĝon ĝis la tempo, kiam la kuracisto estis traveturinta la vilaĝon.



Fig. 3. Maljuna virino el la vilaĝo Jawina, kuracita per incensado cinabra. Post elkuraco ŝi sentis sin sana kaj havis kelkajn infanojn.

Ankoraŭ dum mia rondvojaĝo mi renkontis tian okazintaĵon. Veninte neatendite al la tendo de nomadaj Korjakoj, proksime de la vilaĝo Lesnowska, mi rimarkis lamantan Korjakon, kiu kaŝe forkuradis. Divenante, ke ĝi estas malsanulo, deziranta sin antaŭ mi kaŝi, mi tuj deklaris al la jurtestro, ke mi ne kunprenas la malsanulojn al la hospitalo, ke mi kuracas ilin en iliaj domoj, jurtoj kaj tendoj kaj tion konfirmis „kajuroj", t. e. miaj veturigistoj. Nur post tiu certigo aperis la malsanulo kun grandegaj vundoj sur la piedo, lasis sin ekzameni kaj promesis akurate plenumi la porskribitan manieron de kuracado. Se mia kuraco ne estus efika, mi permesis al li sin turni al unu de sidhavaj Korjakoj, kiu praktikadis la kuracadon per cinabro kaj dekokto de sasaparilo, aŭ, kiel oni tie diras, „daraguj koren" t. e. „kara radiko", ĉar ĝin karegé vendas tieaj komercistoj kaj subĥirurgoj. Mi eĉ donacis al la mastro duonfunton da sasaparilo. Per tia konduto mi akiris plenan konfidon de Korjakoj, kiuj rakontis al mi pri mirindaj efikoj de la kuracado, sed bedaŭrinde mi devis sciiĝi pri la rakontitaj aferoj per tradukanto, kiu siaflanke ne bone konis la rusan lingvon. Pro tio mi nemulte tiam povis kompreni rilate al la afero de enlanda kuracadmaniero. Sed kie mi nur povis, mi demandadis pri tiuj popolaj kuracaj procedoj kaj notis la rakontitan. Jen resumo de tio, kion mi sciiĝis.

Sur Kamĉatka la popolo diferencigas du infektajn malsanojn: „prokaza" kaj „chudaja bol" t. e. lepro kaj sifiliso. La unua laŭdire estas atributo nur de Rusoj aŭ de mestizoj, devenantaj de Rusoj, la dua renkontiĝas ĉe ĉiuj. „Kontraŭ la unua helpas neniuj rimedoj, la duan oni povas elkuraci, uzante ĉu la dekokton de Zitman kun sublimato, aŭ sen ĝi, ĉu ankaŭ ĉirkaŭincensadon per cinabro". La dekokton de Zitman uzadis nur homoj riĉaj, loĝantaj en varmaj ĉambroj. Unu funto da sasaparilo kostis 5—10 rublojn, poste preparis la dekokton subĥirurgo aŭ lia instruato kaj ĉiu el ili postulis bonan pagon por siaj penoj.

Dum la kuracado la malsanulo devis ne eliri el la domo tiel somere, kiel vintre, en la loĝejo devis esti sufiĉe varme, por ke la paciento povu ŝviti. La dekokton trinkis la malsanulo tre varma, du glasojn ĉiutage kaj al ĉiu glaso oni enĵetadis tiom da sublimato, kiom teniĝis sur la trueto de maldika kudrilo. Sed ne ĉiam oni aldonadis sublimaton, plej ofte oni trinkis la dekokton sen ĝi. La kuraca periodo daŭris 40 tagojn. Dum la kuracado estis al la malsanulo malpermesite manĝi fiŝon putrintan aŭ fiŝon salitan, kiel ankaŭ trinki alkoholaĵojn. La tutan tempon kaj precipe nokte li devis bone sin kovri, por ke li ŝvitu kiel eble plej multe. Fininte la kuracadon la malsanulo devis pluajn 40 tagojn observi la porskribitan dieton kaj poste ankoraŭ dum 40 tagoj esti singarda.

Se la dekokto ne helpis, oni deklaradis, ke la malsanulo nepre ne observis ekzakte la porskribitan dieton, ĉar „la dekokto ne povis esti senefika kaj kuracis plej certe".

Tiu kuracmaniero, kiel ni vidas, ne estis komune aplikebla, ĉar ne ĉiu malsanulo havis por sia dispono loĝejon varman aŭ povis dediĉi al la kuracado tiom da tempo. Anstataŭe la kuracmaniero per incensado cinabra estis praktikebla ĉe ĉiuj malsanuloj, egale en varmaj ĉambroj, kiel en nomadaj tendoj, kvankam ankaŭ tiukaze la kabalista nombro da

3 foje 40 tagoj estis konstante observata, sed tamen ne tiel rigore kaj precize, kiel ĉe la kuracado per dekokto.

La ĉirkaŭfumado cinabra, laŭ ofte al mi rakontitaj detaloj, fariĝis jene.

La dozo da cinabro por kuraco de unu plenaĝa homo estis ĉirkaŭe 24 gm. Tiun dozon oni partigis en 12 egalaj porcioj kaj ĉiu el ili servis por unu ĉirkaŭfumado. La malsanulon oni senvestigadis ĝis nuda korpo, poste surmetadis al li veston felan („kamleja"), kunkudritan en formo de ĉemizo larĝa sen fendo antaŭe, surmetatan ordinare, trapasigante per ĝi la kapon. La manikojn oni entiradis internen kaj hermetike ligis. Se la paciento ne havis ulcerajojn sur la vizaĝo, tiam la vizaĝo ne estis elmetata al la fumado, sed se li havis vundojn sur la vizaĝo au sur la lipoj, oni ĉirkaŭligis al li la okulojn per maldika tuketo, ŝtopis lian nazon kaj buŝon per malnova tukpeco kaj ligis la „kamleja'n" super lia kapo. Vestinte la malsanulon, oni lin sidigis en „jurta" sur seĝeto tiel, ke la baskoj de la fela „kamleja" ĉirkaŭprenu liberan spacon, ne tuŝante la korpon de la malsanulo, post kio oni starigis sub la seĝeto grandan vazon el fero, plenigitan per ŝtonoj brulvarmigitaj, kiujn oni surŝutadis per pulvoro de cinabro, iafoje disfrotita kune kun faruno aŭ kun peĉo de la cedro ileksa aŭ larika. La direktanto de la kuracado penis direkti la fumon sur plej malsanajn partojn de la korpo. Kiam la fumo jam ne estis, malgraŭ tio la malsanulo devis sidi plue kelkfoje ĝis la tempo, kiam la ŝtonoj malvarmiĝis. Poste, ne demetante la „kamlejon" la malsanulo kuŝiĝis kaj oni lin zorgeme kovradis, por ke li ŝvitu, kaj dum la ŝvitado donadis al li varman teon. La ĉirkaŭfumado okazadis ordinare ĉiun trian tagon tiel, ke la 40-an tagon finiĝis la kurso kuraca. La dieto postulita porskribis absolutan deteniĝon de alkoholaj trinkaĵoj, de salitaj kaj grasaj manĝaĵoj kaj la malsanulo sin nutris ĉefe per supo de la viando de norda cervo. Post la kuracado la malsanulo observis dieton dum 40 tagoj kaj dum pluaj 40 tagoj devis sin gardi kontraŭ tramalsekiĝo aŭ forta malvarmumo. Kiel rigoroze plenumadis la malsanuloj la porskribojn kuracajn, oni povas konkludi de tio, ke mi vidis malsanulojn, kuracitajn antaŭ 10 jaroj, sed ankoraŭ rifuzantajn trinki alkoholaĵojn spite la granda pasio, kiun la nekulturaj homoj montras por trinkaĵoj alkoholaj.

La enlanduloj, precipe Korjakoj, havas ian religian estimon por cinabro. La mirakla forto de tiu ruĝa pulvoro, por ili nekomprenebla, plenigas ilian animon per admiro kaj dankeco. Kaj facile oni povas ja imagi ĝojon de la homo, kondammita je mortpuno, kiam li denove al la vivo estas redonita.

En Kamĉatka estis malpermesita la vendado de cinabro, sed Korjakoj havigadis al si tiun rimedon per perado de Ĉuhiroj, pagante por ĝi tre kare. Foje vojaĝante de Pallan' al Dranka, mi ripozadis ĉe nomadaj Korjakoj kaj ĉeestis dum la procedo de ĉirkaŭfumado cinabra. Konante min kaj sciante, ke mi ne malpermesas tiun rimedon, ili ne kaŝis sin antaŭ mi kaj al mia demando, de kie ili havas la cinabron, rediris, ke de Korjakoj Olutriaj, aŭ nordaj.

La malpermeso kuraci sin per cinabro havis do la saman efikon, kiel la malpermeso manĝi la fiŝon putrintan. Ni donu al la loĝantaro la rimedojn kaj eblecon sin nutri per sanecaj manĝaĵoj kaj sin kuraci laŭ reguloj de la scienca medicino — tiam la manĝado de fiŝo putrinta kaj la kuracado per cinabro malaperos per si mem, sed se ni donas nek unu nek alian, la malpermeso restos senviva litero.

---

La felietono de „Voĉo de Kuracistoj" aperados de tempo al tempo kiel aparta aldono en formato de 4 paĝoj de la gazeto.